# SUD FRANCIA ŜTELO

FEDERACIO LANGVEDOKO - ROSILJONO .

## VARBI ...

Leviĝas tiam vigla diskuto pri la neceso varbi : ĉu varbi novajn membrojn aŭ varbi respondeculojn, do estontajn varbantojn ? Por kelkaj necesas unue trovi aktivulojn kaj poste esperantoparolantojn por aktivi ekstere. Ne disigeblas la laboroj trovi esperantistojn kaj servi al la homoj interne de la Asocio.

Bedaŭrindas, ke post 100 jaroj da uzado, ekzistas nur kvin ekstermovadaj gazetoj (Monato, El Popola ĉinio, la Kancerkliniko, Fonto kaj literatura Foiro). Pli gravas aktivuloj, eĉ se ili misuzas akuzativon ol homoj, kiuj dum la tuta vivo diskutos pri akuzativo.

Multaj ne aktivas surloke pro personaj surlokaj aŭtoritatecoj.

ĉu la ĉefa problemo ne estas havi pli da AKTIVULOJ en la venonta generacio ?

El la protokolo de la kunsido de
Federaciestroj,
Parizon, la 4-an de junio 1983-a.

# NOTU, SUR VIA KALENDARO,

la unuan festivalon pri/en Esperanto, organizata de UFE (Uniiĝo Franca pri Esperanto) la 26-an kaj 27-an de novembro 1983-a, en granda salono, meze de Parizo. En la kvin projektitaj prezentoj,(3 sabate, 2 dimanĉe), sin prezentos almenaŭ 7 kantistoj, kabareda trupo, teatrotrupo(j).

Estas interese por la malparizanoj noti ke ĝi okazos tuj post la "studtago pri Esperanto" de la Universitato de Paris VIII-Vincennes, kies programo grandlinie jenas (en la franca ) :

- Problème de la langue internationale vu par les linguistes.
- Origine et évolution de l'Espéranto (P. Janton)
- Description linguistique (P. Janton)
- Applications pratiques de l'Eo (F. Szabo-Felso, G. Lagrange, J. Le puil, H. Tonkin, Franck)
- Enseignement de l'Eo dans le monde (G. Pirlot, R. Triolle)
- La langue internationale : Problème linguistique ou problème de société (M. Duc Goninaz)

Tritaga intensa programo, al kiu ni invitas ĉiujn esperantistojn partopreni.

Informojn vi povas ricevi de la Federacio aŭ tutsimple de la organizantoj, tio estas :
UFE
4 bis, rue de la Cerisaie
75016 PARIS
Tel : (1) 2786886

ESTRARO
DE LA
FEDERACIO

Prezidanto :
MAURIN Frédéric
20,rue de l'Aiguillerie
34000 MONTPELLIER
tel : (67) 662101

Vicprezidantoj :
VIERNE Yvette
5,rue du docteur Roux
34000 MONTPELLIER
tel : (67) 541543

HENIN Jean
Rte de Montcayroux
48500 LA CANOURGUE
tel : (66) 328636

Sekretario :
AMOUROUX Jean
1, rue de Sorède
66000 PERPIGNAN
tel : (68) 674127

Kasisto :
NEGRON Lucette
Chemin des Amandiers
34400 LUNEL



# TURISMO.

Kiel decidite en Carcassonne, nia Federacio estas preparanta gvidlibron, lige kun estonta nacia gvidlibro pri kiu, post pluraj monatoj ni ankoraŭ atendas informojn de UFE...

Kelkaj kontribuantoj sin anoncis sed ĉies helpo estas dezirebla. Unue, ni limigos nian laboron al nia Fderacio, poste ni aldonos la najbarajn federaciojn por realigi gvidlibron pri Sud-Okcidenta Francio, kie turismo floradas. Kompreneble, tio postulas sufiĉe da tempo (2 jarojn ?). Nia unua paŝo estu la kolektado de informoj, ĉiuspecaj informoj por eksterlandano, kiu ŝatus malkovri nian regionon.

Imagu vin en lando, kies lingvon vi mabone aŭ tute ne parolus, en diversaj situacioj...

La dua paŝo estos la ordigo de la materialo, la tria la selektado kaj fine la eldono.

Ne temas pri beletra gvidlibro sed pri praktika, ne ankoraŭ ekzistanta en la franca lingvo.

Pripensu tion, kion vi povus bezoni : ĉu la telefonnumeron de turismoficejo, ĉu simplan urboplanon kiel sur via poŝkalendaro, ĉu la rekomenditajn vizitojn, ĉu la datojn de festoj aŭ festivaloj eĉ se ne tre konataj sed vidindaj, ĉu la recepton de specialaĵo, ktp...

Ankaŭ ne forgesu tion, kion vi NE rekomendus eĉ se ĝi akiris tri stelojn en oficialaj gvidlibroj.

La somersezono estis ideala por eltondi nian prilokan gazeton. Mi provis listigi la erojn ekspluateblajn sed rezignis, senĉese trovinte novajn interesokampojn. Ne rekopiu la verdan (??) aŭ ruĝan Michelin-gvidlibrojn! Vian juĝon personan ni alte taksas ĉar vi loĝas surloke.

.../...

Pardonu la ripeton : se vi malkovrus novan regionon aŭ urbon, kiujn informojn vi bezonus unuatempe ? Ĉu pri la transportiloj, loĝejoj, manĝejoj, distrejoj, riparejoj, helpejoj ?

En oktobro, ni jam kunmetos niajn eltrovitaĵojn kaj tiam deduktos tion, kio mankas :
ĉiu kontribuo, eĉ minimuma, helpos.

Ni ne forgesu : ni ĉiam devas pruvi, ke Esperanto estas utila, ne malhavebla ...

Jean HENIN

## Omaĝe al mia instruistino.

Komence de julio, forpasis en Clermont-Ferrand Fraŭlino C. Heuter. Eble ne konata de vi, sed multaj el vi skribis al ŝi, al K.S.M.,Korespond Servo Mondskala, pri kiu ŝi respondecis dum tiom da jaroj ĉiam zorgeme kaj fidele.

Konvinkiga, sed tiel tolerema, aktivulino el la aktivuloj.

Instruistino, ŝi fariĝis al mi iom post iom vera amikino. Neniam mi estus trapasinta Clermont-Ferrand-on sen ŝin viziti.

Ke tiuj lastaj vortoj estu al ŝi mia lasta vizito.

Frédéric Maurin.

# MANKOLISTO !

Por kompleti la kolekton, mankas al mi la jenaj numeroj de "SUDFRANCIA STELO" :

2, 3, 6, 10, 21, 22, 25, 34, 35, 36, 38, 39, 67, 68.

Ĉu vi povas min helpi ? Antaŭdanke kaj amike,

Jean AMOUROUX 1, rue de Sorède 66000 PERPIGNAN



## AŬTUNA KOMITKUNVENO

Ni tutkore invitas la membrojn de la Federacio partopreni la venontan komitatkunvenon, kiu okazos en :

Maison Familiale du Lazaret
La corniche Sète
La dimanĉon 9-an de oktobro 1983-a.

La kunveno de la komitato komenciĝos je la 9-a precize, tiel frue pro la abunda planita tagordo. Ĝi finiĝo je la 18-a proksimume. Ni forte insistas por ke la partoprenontoj respektu la horaron.

Jen la tagordo de la komitatkunveno (publika) :

- Federacia bulteno : propono de la prezidanto. (la propono kuŝas en tiu ĉi bulteno)
- Interna Regularo : raporto.
- Agadplano por la venonta jaro :
  - Financa vidpunkto
    - + Plialtiĝo de la kotizo
    - + Plinombrigo de la membroj
    - + Aliaj financaj rimedoj
  - Novaj agadplanoj
    - + Gvidlibro pri Turismo
    - + "La 1000 vortoj en Esperanto"
    - + Kampanjo SELIN de UFE
- Respondecigo de la komitatanoj (Artikoleto en tiu ĉi numero)
- Rilatoj inter Federacio kaj grupoj :
- Raporto de grupestroj kaj proponoj

La estrarkunveno (publika) traktos interalie :
- + Elekton de nova estraro
- + Kreadon de komunikada reto inter la estraranoj kaj komitatanoj
- + Rolo de la Federacio en la grupoj.

Ni insistas pri la fakto, ke, krom nia federacia kongreso, tiu ĉi kunveno estas la plej ĉefa momento en la jara agado. Ĉeesto de ĉiuj respondeculoj, grupestroj, komitatanoj kaj movadanoj estas kondiĉo al sukceso de nia afero.

La partoprenontoj bonvolu sin anonci antaŭ la 1-an de oktobro al : Jean AMOUROUX
1, rue de Sorède 66000 PERPIGNAN

## KOMITATANOJ, al la laboro !

Jam de pluraj monatoj, la propono kuŝas sur papero kaj atendas decidon. La afero estas simpla: interesigi la komitatanojn al la diversaj laboroj de la estraro.

La kialoj de la urĝeco de la propono estas du :

+ Unue, demokratigo de nia strukturo en la kadro de niaj strukturoj.
+ Due, la tuta laboro estas tro peza por la estraranoj.

Efektive, ĝis nun, partoprenis aktive al la laboro de la estraro, krom la prezidanto (Administrado, rilatoj kun UFE), la sekretario (Administrado, ĝeneralo organizo) la kasistino (financo), ankaù J. Hénin (Libro-Servo, gvidlibro pri turismo, "1000 vortoj"), kaj R. Frus (Sud Francia Stelo).

Ni do decidis prezenti al la diversaj komitatanoj erojn de nia laboro, por ke ili ŧransprenu parton aù tuton. Kvamkam malfacile, mi provis listigi la koncernatajn erojn :

1- Rilatoj inter UFE kaj la Federacio
2- Rilatoj inter la Federacio kaj la grupoj
3- Organizo de kongresoj, komitatkunsidoj...
4- Organizo de lingvostaĝoj, aù pri movado...
5- Akcepto de eksterlandanoj
6- Financo kaj Administrado
7- Rilatoj kun oficialuloj : urbestroj, deputitoj...
8- Federacia bulteno : SFS
9- Helpo al malviglaj grupoj
10- kontakto kun aliaj esperantistaj (SAT, JEFO) neesperantistaj Asocioj.
11- Aliaj.

Jam pluraj respondecas pri unu aù kelkaj aspektoj de nia agado. Ke ilia agado estu ekzemplo al la ceteraj.

F.M.



# VIVO DE LA GRUPOJ

## lokaj respondeculoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| BEZIERS | : | Espéranto, 9 rue Picot<br>34500 | (67) 311318 |
| CARCASSONNE | : | Borque, 6 rue P. Néruda<br>11000 | (68) 254513 |
| MONTPELLIER | : | Espéranto, CIJ,<br>Imp. de la petite Corraterie<br>34000 | |
| NIMES | : | Espéranto, 10 grand'rue<br>30000 | (66) 641974 |
| LOZERE | : | Hénin, Beauregard,<br>48500 La Canourgue | (66) 328636 |
| PERPIGNAN | : | Espéranto,<br>72, av ch. de Gaulle 66000 | (68) 342218 |
| | | Amouroux, 1, rue de Sorède<br>66000 | (68) 674127 |

• Nimes ...

Ni ĉiuj bedaùras la forpason de S-o JANNEZ, antaù pluraj monatoj, kiu propagandis favore al Esperanto unue kiel prezidanto de la Nima grupo, sed ankaù per trafa agado en neesperantistaj medioj.

Tial, la grupo kunveniĝis la 5-an de junio por elekti novan prezidanton de la grupo.S-on Schlumps la ĉeestantaro kandidatigis, sed respondon li faros nur dum la venonta kunveno, la unuan lundon de oktobro.

Aliparte, S-o Carrey, la reelektita sekretario invitis ĉiujn esperantistojn partopreni "Merguez-aranĝon" en sia ĝardeno, fine de junio.

● Montpellier...

La grupo bedaùras forpason de la patro de S-ino Bony, eksa instristino de Esperanto en Montpellier, kaj de la gepatroj de D-ino Vierne, prezidanto de la grupo kaj vicprezidanto de la Federacio.

Malgraù tiuj malfacilaĵoj, la grupo viglas, kaj sub la gvidado de S-ino Callet, la nova sekretariino, kaj de alia(j), la preparo de la Internacia Semajno en Sète iris sukcese. Laù la malmultaj informoj, kiujn ni ricevis, proksimume 40 partoprenantoj ĉeestas tiun Semajnon, inter ili pluraj eksterlandanoj.

Grava decido, eble signifoplena, estas la ŝanĝiĝo de la sidejo, kiu nun troviĝas :

Centre Internationale des Jeunes
Impasse de la petite Corraterie
34000 MONTPELLIER.

Vi do bonvolu korekti viajn adresarojn.

Ĉiun lundon, ankaù, okazas konstantkunveno tie, por esperante interparoli, pritrakti proponojn, helpi al la sekretaria laboro...

En la agada programo de la grupo, ni legis interalie :

- la 18-an de septembro, partopreno de la grupo en la "Foire aux Associations" en la peyrou.
- La 19-an de septembro, la grupo kaptas la okazon de ĉeesto de fama hungara esperantistino, Eva FARKAS, por prelegi ŝin. Kunvenon kiel kutime en "La Croix Bleu" 15, rue du faubourg Figuerolles 20h45
- Venontajn kunvenojn :
  La 3-an de oktobro
  La 7-an de novembro
  La 5-an de decembro

Alia anonco, sed tamen grava, koncernas la kotizojn por la jaro 1984 :

| | | |
|---|---|---|
| . Groupe + UFE+ SFS | unuopulo | 85FF |
| | paro | 155FF |

● Perpignan ...

Sep lernantoj trapasis sukcese la ekzamenon "Atesto pri lernado"-n :

- Charbonnel Paul, Perpignan
- Dern Irma, Perpignan
- Manguine Jeannine, Perpignan
- Lable-Baixas Suzette, Perpignan
- Gouges Marguerite, Thuir
- Dern Nadine, Perpignan
- Lable Pierre, Perpignan

Okazis la 21-an de aùgusto en Argelès-Plage pikniko kun la partopreno de ges-oj LLOANSY kaj ges-oj CATIL, kiuj libertempis en tiu regiono.

● Perpignan (USCM-Esperanto)...

Jean Amouroux raportas al ni pri USCM-E-o :

" Mi tre bedaùris ne partopreni en le Esperanto-Semajnofino de Valras la 18-an kaj 19-an de junio. La kialo estas ke, je la samaj datoj, okazis la festotagoj de la 20000-enloĝanta kvartalo "Moulin à Vent- Vertefeuille" al kiu mi apartenas.

Jam duan jaron, la kvartala grupo USCM-Esperanto (Union Sportive et Culturelle du Moulin à Vent) tre aktivas en la sino de la "Festkomitato" per aranĝo de tre impona Esperanto-ekspozicio ĉe la kvartala "Junulardomo" : afiŝoj, anoncoj per radio, trairantaj aùtomobiloj kun laùtparolililoj, 7.000 programoj en la leterkestojn, anoncoj kaj raportoj kun foto pri la ekspozicio en la plej granda ĵurnalo " l'Indépendant".

Resume, tre grandaj labor kaj fortinvestoj, kies tuja rezulto ne eblas - kaj cetere ne gravasmezuri. Laù mi, kio plej gravas, estas ke la Esperanto-kerno ĝermas tute normale ( mi eĉ diru banale ) en la ordinara vivo de la kvartalo profitante ĝiajn strukturojn kaj publikon."

# LINGVOSTAĜO :

Kiel plurfoje anoncite, esti organizita lingvo-staĝo en Valras-Plage la 18-an kaj 19-an de junio. Proksimume 20 personoj partoprenis la aranĝon, interalie Renée TRIOLLE, sekretario de UFE (Uniiĝo Franca por Esperanto), kaj Doktoro ALBAULT, prezidinto de UFE kaj nuna prezidanto de la Akademio de Esperanto.

La kurso disvolviĝis en simpatia ( kaj varmega ) etoso, sub la lerta gvido de S-o BOUMAL, el Perpignan. Tamen, ni notos ke la programo entenis prelegojn pri diversaj gramatikaĵoj ( kaj vi imagu kiel riĉa kaj interesoplena estis la diskuto pro ĉeesto de D-o Albault), kaj (iom surpriziga) distra vespero.

La alia surprizo : Pli da 8 personoj kandidatiĝis al diversaj organizitaj ekzamenoj, eĉ unu al Atesto pri Kapableco.

Tamen, ni bedaŭras ke la komitatkunveno, planita samtempe kiel la lingvo-staĝo, estis prokrastrita pro malĉeesto de plejparto de la komitatanoj. Kelkaj eĉ ne respondis al nia invitletero. Ni esperas Remée Triolle, nacia sekretario, ne tro malbone taksos nian federacion surbaze de tiu evento.

Konklude, aranĝo sukcesa, kiu estas tutcerte renovigenda ( eble pri alia temo ) , kaj kiu pruvas la taŭgecon de komuna laboro kun alia federacio, ĉifoje en Valras kun niaj amikoj el Midi - Pyrénées.



# NOVELOJ PRI U.F.E.

XX Kampanjo SEL. IN. 84

La kampanjo SE. IN. 84 (SELekte INformi) estis oficiale lanĉita dum la Nacia Kongreso en Romans.

Kiel dirite, ĝi disvolviĝos trifaze :

- Informletero al emkomputeritaj adresoj
  telefona loka kontrolo de la adresitoj.
- Prezentletero kun adaptita reklamilo kaj "Esperanto-Actualités"
  telefona loka kontrolo de bona trafo
- Konstanta servo de "Esperanto-Actualités" kaj propono de servoj : kursoj, prepegoj, ekspozicioj ...

Evidentiĝas ke la laboro devas esti farita surloke per skipo (prefere trihoma) por kompili la adresojn, telefona kontrolado, librotenado kaj trassendo al UFE ...

UFE pretas investi el la buĝeto de la Asocio, sed, kompense, ĝi proponas kontrakton kun la interesitoj.

Tiucele, ni kore invitas ĉiujn grupojn de la Federacio krei skipojn trihomajn. Ekde la kreado, kontaktu

ĉu : U.F.E.
4, bis, rue de la Cerisaie
75006 PARIS
Tel : (1) 2786886

ĉu : Federacio Langvedoko-rusiljono
ĉe Frédéric MAURIN
20, rue de l'Aiguillerie
34000 MONTPELLIER
Tel : (67) 662101

XX Kunvenoj pri rilatoj inter la Federacioj

Okazis la 4-an de junio, kunveno de federaciestroj kun la estraro de UFE. La tagordo estis fiksita de la komisiono "Rilatoj UFE-Federacioj", kaj pritraktis precipe la komunikadan problemon ene de la Asocio.

.../...

En la tagordo, substrekendas :

- ĝeneralaj rilatoj inter UFE kaj la Federacioj per regula raporto de federacia respondeculo (aŭ membro).
- Malparizigo de la komitatkunsidoj, kiam ties temo eble interesas eksterestraran (esperantistan) publikon.
- Organizo de staĝoj por respondeculoj. ĝi celas trajnigi la homojn, kiuj ĝis nun volonte (sed ne ĉiam efike) akceptis respondecon ian en la grupoj, federacioj ...

ĉiuj membroj, kiuj deziros ricevi la protokolon de tiu kunveno, redaktita de Renée TRIOLLE, bonvolu informi Frédéric MAURIN kaj aldoni tri poŝmarkojn kaj koverton, por la resendo.

XX "AMIKOJ DE L' ESPERANTO"

La celo de la Asocio estas havi 10.000 "Amikojn de Esperanto" ĝis la jarcenta datreveno en 1987.

Tiu celo estas atingebla dank'al la membro karto AMIKARO. Tiaj membro-kartoj validas por 5 jaroj kaj estas proponeblaj al ĉiuj simpatiantoj, familianoj, geamikoj, kiuj nun ne pretas eniri la movadon.

UFE kvitancos ĉiujare la plej bonajn kolektantojn per librodonadoj. Tiu kampanjo kompletigas ekstere la enasocian planon de "KLUBO 87".

La prezo estas :

| | |
|---|---|
| Unu karto (Valida por 5 jaroj) | 60FF |
| 5 kartoj | 300FF |
| 10 kartoj | 600FF |



XX Metodo 10 aŭ Paŝoj al eklernado.

Nun ekzistas en la libroservo de UFE nova metodo por organizi finsemajnan kurson. ĝi estas kaj informilo pri la lingvo kaj la movado, kaj lern-instigilo. Post dek lecionoj ilustritaj, la staĝanoj estas plene informitaj pri la taŭgeco de nia lingvo.

La mendo de tiu ĉi broŝureto ĉiam devas esti farita al UFE. La prezo estas :

| | |
|---|---|
| 1 kajero | 25FF |
| gvidfoliaro por la gvidanto | 5FF |

minimuma mendo : 4 kajeroj.

Ni profitas la okazon rememori al vi la ekziston de la :

| | |
|---|---|
| "Metodo 11" | 33FF |
| "Metodo 12" | 35FF. |

# ATENTU..

Venonta SFS aperos la 15-an de DECEMBRO.

ĉiujn artikolojn vi bonvolu sendi al la prezidanto (kiu transdonos poste al la redaktoro) antaŭ ma 1-a de Decembro.

Neniam forgesu ke tiu bulteno estas via bulteno Do partoprenu al ĝia realiĝo kaj pliboniĝo aktive.

# .KAJ NE ATENDU !

# SFS - SFS : kia venonteco ?

Jam de longe revenas dum preskaŭ ĉiuj kunvenoj de mia federacio, demandoj kaj solvoprovoj pri nia bulteno SudFrancia Stelo.
Konstatendas ke ĝis nun, nenia konvena solvo alportiĝis.

La problemo fariĝis sufiĉe grava pro du kialoj :

- La bulteno ne alportas sufiĉe frue informojn al la simplaj membroj pri la diversaj okazint/ant/ontaĵoj en la Federacio.
- Aliparte, la komitato kaj la estraro ne povis uzi tiun eblecon ( la bultenon ) kiel kontaktilo kaj informilo pro la grandaj malfruiĝoj. Ni informiĝis la komitatanoj per cirkuleroj, leteroj ...
Tamen, tio estas malkontentiga ĉar unue ĝi estas sufiĉe elspeziga, kaj due ĝi ne povas fariĝi definitiva sovo al la problemoj de SFS.

Komprenenble, oni ne povas diserigi la du problemojn, nek imponi prioritatojn. Pro tio, mi proponas tutan solveblecon, kiun oni taksos tutcerte tro ambicia, sed kiu prezentas la avantaĝeton konsideri SFS-on kiel plurcelan bultenon.

=+=+=+=+=+

Konsiderate la ĉi subajn rimarkojn, kaj la laboron respondan al preparo de SFS, ŝajnas deviĝo dispartigi al diversaj personoj ( ĉu komitatanoj, ĉu aliaj membroj) la diversajn taskojn de SFS, interalie informan kaj enasocian aspektojn.

Tia konsistigo de skipo pri SFS fariĝas al miaj okuloj necesa .

.../...



Temas pri skipo de tri personoj : (Ideale)

- respondeculo pri la movada, enasocia parto.
- respondeculo pri distra, literatura, ĝenerale informiga parto.
- Teknikisto.

La unua parto devas finfine anstataŭiĝi la nunajn cirkulerojn, rondajn leterojn... ĝi celus informi ĉiujn <u>respondeculojn</u> de la Federacio, de grupo, ĉiujn movadanojn ( prefere, mi dirus movadistojn).
Ĉar ni fojfoje konstatis ke multaj simplaj membroj ne interesiĝas al vivo de nia Asocio, tiu parto devas ĉefe rezervita al la movadanoj. Pro tio, ĝi ne devas esti kunmetita kun la alia dua parto, kaj tial, SFS devas en la praktiko dividiĝi en du partetoj.

Aliparte, la dua ero devas interesi ĉiujn. ĝi entenus informojn pri la staĝoj, la kongresoj, pri la okazintaĵoj kaj okazontaĵoj en la Federacio. Pli simple, ĝi devus respondi al nuna SFS, eĉ eble iom pli ĝenerala.

Tio estas la teoria aspekto de la propono. Restas komprenenble ankaŭ la financa aspekto. Mi proponas la jenon :

- Altiĝo de la prezo de SFS, en la dua aspekto, (15FF ?)
- Enskribiĝo de ĉiuj komitatanoj de la Federacio, de ĉiuj estraranoj de grupo al la unua formo. Tiu aspekto estas ĉefa. Se ni volas ke tiu parto respondu al nia deziri krei laborigan interligilon, ĝi devas esti ricevita de ĉiuj respondeculoj en la Federacio.
La kotizo estos pagita de la Federacio, koncerne la komitatanojn de la Federacio, kaj de la grupoj mem, koncerne la estraranojn de grupo.
Konsiderate la diversajn elspezojn, ne troa prezo estas 25/30 FF ĉiujare.

Frédéric MAURIN

# ENHAVO *


Paĝo 1 : "Varbi "
" 2 : "Notu, sur via kalendaro,"
" 3 : "Turismo"
" 4 : "Omaĝe al mia instruistino", "Mankolisto"
" 5 : "Aùtuna komitatkunveno : invito "
" 6 : "Komitatanoj, al la laboro"
" 7 : "Vivo de la grupoj"
" 8/9 : " " " " " " " "
" 10: "Lignvostaĝo : raporto"
" 11/12/13 : "Noveloj pri UFE
" 14: "SFS: kia venonteco ?"
" 15: " " "


ESPERANTO ĈIES AFERO !!


Exp : Fédération Espérantiste du Languedoc-Roussillon
Chez MAURIN Frédéric, 20, rue de l'Aiguillerie